

**NSiR - Nova Sento in Rete  
N. 1126 (6/2022)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta [fei@esperanto.it](mailto:fei@esperanto.it) ; internet  
<http://www.esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo: posta [iej@esperanto.it](mailto:iej@esperanto.it) ; internet  
<http://iej.esperanto.it>

Via Villorosi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, [notiziario@esperanto.it](mailto:notiziario@esperanto.it)  
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"

**NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR**

I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.

Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

**ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA**

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

**LIBRERIA**

<http://www.esperanto.it/libri.htm>

[feilibri@esperanto.it](mailto:feilibri@esperanto.it)

**INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA**

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>

Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

**IL 5 PER MILLE ALLA FEI**

Indicate il codice fiscale **8009577014** nella vostra dichiarazione dei redditi,  
realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli

- Dichiarazione della Federazione Esperantista Italiana .....	2
- Ni ne ĉesu labori por paco .....	2
- Bando per borse di studio .....	3
- Novaj libroj .....	4
- Ĝemelaj urboj, ĉi foje al Ĉilio! .....	4
- Presentazione esperanto a Brescia .....	5
- Esperanto kaj arto .....	5

## DICHIARAZIONE DELLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA

La italaj esperantistoj firme kondamnas la uzon de forto por solvi la internaciajn kontrastojn. Ili estas, sentas sin proksimaj kaj angoroplenaj pro la ukrainaj geamikoj trafitaĵoj de la milito, kaj pro la rusaj geamikoj trafitaĵoj de misinformado kaj propagando. Ili substrekas la gravecon de la utiligo de la lingvo Esperanto por la internacia komunikado inter popoloj, inter malsamlingvaj civitanoj, por paco kaj harmonio inter la nacioj. Rekta komunikado, ne filtrita, estas la sola antidoto kontraŭ antaŭjuĝoj, malamoj, perfortoj, militoj.

Gli esperantisti italiani condannano con fermezza l'uso della forza per la risoluzione delle controversie internazionali. Sono, si sentono vicini e preoccupati per gli amici ucraini colpiti dalla guerra, e per gli amici russi colpiti dalla disinformazione e dalla propaganda. Sottolineano l'importanza dell'utilizzo della lingua esperanto per la comunicazione internazionale tra popoli, tra cittadini di madrelingue diverse, per la pace e l'armonia tra le nazioni. La comunicazione diretta, senza filtri, è l'unico antidoto contro i pregiudizi, gli odi, le violenze, le guerre.

dott. Luigi Fraccaroli

*Presidente della Federazione Esperantista Italiana*

## **“NI NE ĈESU LABORI POR PACO INTER HOMOJ KAJ NACIOJ”: ALVOKO DE UEA AL LA ESPERANTISTOJ KAJ LA MONDO**

Reage al la militaj tondroj kaj homa sufero en la oriento de Eŭropo UEA deklaras:

En la historio de la homaro homoj strebis al la idealo de paco, sed neniam sufiĉe por certigi ĝian finan atingon. Tamen precize nun niaj modernaj komunikiloj havas la potencon unuigi la tutan mondon por individue kaj kolektive kriptesti uzadon de perforto kontraŭ senkulpaj kunhomoj, niaj gefratoj. La memoro en kaj ekster Eŭropo pri du teruraj mondmilitoj kun milionoj da mortintoj bilde kaj vorte transdoniĝis kaj gravuriĝis en la konscio de ĉiuj nunaj generacioj.

Kian respondecon ni havas kiel esperantistoj, kiam eksplodas nova konflikto? La iniciatinto de Esperanto, D-ro L. L. Zamenhof, konsciis kaj mem spertis la kondiĉojn, kiuj kaŭzas militadon. Li kunligis siajn pacajn idealojn kun lingvo, kiu ebligas respektaman egalecon en la komunikado cele al reciproka interkompreniĝo inter la homoj. Vera bazo por tiu maturiĝo, kiu kondukus al definitiva forlaso de la deziro superregi aŭ suferigi niajn planedajn kunloĝantojn. En 1906, okaze de la 2-a Universala Kongreso de Esperanto, en Ĝenevo, li deklaris: “Nun, kiam en diversaj lokoj de la mondo la batalado inter la gentoj fariĝis tiel kruela, ni, Esperantistoj, devas labori pli energie ol iam”.

Nia tasko estas klara. Komenci en nia propra konscio elradikigi antaŭjuĝojn kaj malamon al konatoj kaj nekonatoj. Poste kunlabori kun ĉiuj bonkoraj individuoj, kiuj dediĉas sin al edukado por interhoma kompreniĝo. Ni jam akceptis tiun

sindevontigon, lerninte Esperanton. Sekve ni ne laciĝu insisti, ke niaj registaroj reprezentu la pacemajn dezirojn de siaj popoloj vivi en senkonflikta harmonio laŭ modeloj de la plej altaj etikaj principoj ekzempligitaj en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj. Ni insistu, ke la membroj de Unuiĝintaj Nacioj devigu respekton al tiu Deklaracio, al la Ĉarto de UN kaj al ĝiaj fondaj principoj, kiuj naskiĝis de la deziro, ke neniam ripetiĝu la hororoj de amasmilitado.

Ni levu niajn voĉojn individue kaj kolektive kiel anoj de internacia movado, kiu ĉiutage laboras por paca interkompreniĝo. Per tiu potenco ni konsciigu al niaj registaroj, ke necesas plenumi la promesojn faritajn al la mondpopolo: solvi konfliktojn antaŭ ol ili erupcias katastrofe por ĉiuj mondloĝantoj.

UEA ne prenas politikajn poziciojn, krom pledi por la justeco de egalrajtiga internacia komunikilo, kiu faciligos la atingojn de pacaj idealoj kaj amon inter la popoloj. Ni tamen nature kaj senlace esprimas nian solidarecon kun ĉiuj samideanoj, kiuj suferas pro perfortaj atencoj kontraŭ iliaj rajtoj al paca, sekura vivo. Ni jam nun atentis, kiel ni povas helpi en la nuna situacio. La konto Espero ĉe UEA (<https://uea.org/alighoj/donacoj/espero>) estis fondita okaze de alia kruela milito en Eŭropo por interalie iom helpi al familioj de esperantistaj viktimoj, kaj ni uzos tiun kaj aliajn rimedojn por montri nian solidarecon kun niaj kuraĝaj familianoj (tiu konto estas ĉiam malfermita por tiucelaj kontribuoj). La fondinto de UEA, Hector Hodler, celis krei kunlaboran reton de samideanoj tra la tuta mondo. Ni memoru la modelan laboron de nia Ĝeneva oficejo por kontaktigo de familianoj en alia kriza milito kaj montru, ke ni kapablas tuj agi por doni la praktikan helpon, kiun bezonas membroj de nia tutmonda familio.

Aliĝas al tiu deklaro la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

## **BANDO PER BORSE DI STUDIO A CORSO DI PERFEZIONAMENTO DI ESPERANTO**

La Federazione Esperantista Italiana (FEI), per premiare i migliori allievi dei corsi di esperanto, istituisce per l'anno 2022 **5 Borse di studio** per la partecipazione ad un corso residenziale di perfezionamento di esperanto.

### **1) Le borse di studio**

Verranno assegnate ai migliori allievi dei corsi per partecipare a Brescia al Congresso Italiano di Esperanto che si terrà dal 20 al 27 agosto 2022 ed in particolare ai corsi di perfezionamento che si terranno durante il congresso stesso.

Le borse di studio istituite sono riservate ad allievi che abbiano:

- o frequentato in presenza negli anni 2020-2021 – 2022 un corso di esperanto di I o di II grado terminandolo con diploma rilasciato dall'IIE;
- o partecipato ad un corso di esperanto di I o di II grado in rete (kape o kirek) o in DAD terminandolo con profitto;
- o frequentato con profitto un corso universitario di esperantologia.

I partecipanti devono essere iscritti alla FEI e non devono aver mai usufruito in precedenza di queste o altre borse simili istituite dalla FEI.

Le borse di studio consistono nell'iscrizione al congresso e nell'ospitalità con trattamento di pensione completa in strutture studentesche od equivalenti. Eventuali soluzioni migliorative sono a carico del borsista.

I borsisti dovranno frequentare regolarmente il corso di lingua esperanto (nelle mattine di lunedì, martedì, giovedì e venerdì) e potranno partecipare alle altre attività congressuali che si terranno in orari diversi dal corso. Dovranno inoltre, al termine del corso, compilare una scheda di valutazione e partecipare contestualmente ad un colloquio con il docente ed un responsabile FEI. Si impegnano inoltre ad inviare alla FEI (via Villaresi 38, 20143 Milano, [feisegreteria@esperanto.it](mailto:feisegreteria@esperanto.it)) entro il 30 settembre 2022, una relazione scritta, in esperanto, sull'esperienza congressuale.

## **2) Come partecipare**

Per partecipare all'assegnazione della borsa di studio occorre inviare, preferibilmente a mezzo posta elettronica all'indirizzo [feisegreteria@esperanto.it](mailto:feisegreteria@esperanto.it), domanda in cui vengono precisati: le generalità del richiedente, il tipo di corso frequentato, l'esito dello stesso, il nome dell'insegnante o tutore, nonché la dichiarazione di essere a conoscenza delle condizioni per ottenere la borsa di studio. Chi ha superato un esame o ha ricevuto un attestato, deve allegare copia dello stesso.

La domanda deve pervenire entro e non oltre il 20 giugno 2022.

Nel caso in cui l'esame venga sostenuto dopo tale data, i richiedenti potranno essere presi in esame dalla commissione nel caso in cui le borse di studio non siano già state assegnate.

## **3) L'assegnazione**

Una commissione, consistente nel presidente della FEI, presidente della IEJ, segretario FEI, provvederà, a suo insindacabile giudizio, ad individuare gli assegnatari delle borse di studio. Costituiranno motivo di preferenza i meriti conseguiti durante i corsi e le relazioni dell'insegnante (o tutore).

Per informazioni: [feisegreteria@esperanto.it](mailto:feisegreteria@esperanto.it)

## NOVAJ LIBROJ

	<p><b>La memoraĵoj de Julia Agripina</b> A. Löwenstein Un nuovo romanzo della famosa scrittrice, che si dipana nell'antica Roma. ISBN 9789077066737 F.E.L., Antverpeno 2021 21 cm., 564 p. € <b>20.00</b></p>
<p><b>La nekredbla aventuro de la misio Moresten'</b> E. B. Coffinet Che aspetto avrebbe il mondo ora, se l'arciduca Francesco Ferdinando non fosse stato assassinato? ISBN 9789077066690 F.E.L., Antverpeno 2020 21 cm., 121 p. € <b>12.00</b></p>	

## ĜEMELAJ URBOJ, ĈI FOJE AL ĈILIO!

La ĝemelaj urboj Romo kaj Parizo daŭrigas sian retan turneon kaj haltas en Ĉilio. Okaze de tiu etapo en la suda hemisfero, ni parolos pri sezonoj. Kiel viaj vivstiloj estas influataj de sezonoj? Kiel vi organizas viajn vivojn pro vintro aŭ somero kaj kiam ili okazas? Kiam vi ferias? Ĉu viaj ŝatokupoj ŝanĝiĝas laŭ sezonoj? Ĉu vi praktikas sezon-dependan sporton?

Pri cio ĉi venu paroli kun ni sabaton la 5an de marto je la 19a (Roma kaj Parizo horo), je la 15 (Ĉila horo). Ĉiuj estas bonvenaj!

<https://us02web.zoom.us/j/81482386200?pwd=NjZORUIxaWNZdld5SjJlVldkWFsQT09>

ID kunveno: 814 8238 6200


Pasvorto: 912005

## PRESENTAZIONE ESPERANTO A BRESCIA

Erano collegati 1600 studenti e 200 insegnanti!

<https://www.youtube.com/watch?v=3jTRXevaNTw&authuser=0>

## ESPERANTO KAJ ARTO



L. Lotto, *Portreto de dominikano laŭ imago de Petro Martiro*

